**KONGRESA REZOLUCIO**

La kongresanaro de ILEI

Kunveninte el 19 landoj el 3 kontinentoj en la Fakultato pri Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak, Serbio, por la 52-a ILEI-Kongreso, 13-20 julio 2019, kun la ĉeftemo « *Lernado en virtualaj komunumoj* »

- Dankas la urban kaj universitatan estrarojn por la gastama akcepto kun muzika-danca aranĝo
- Dankas la lokajn organizantojn, nome Radojica Petrovic, Aranka Laslo, Blanka Laslo kaj Nebojŝa Stankovic
- Bonvenigas la novajn universitatajn interligojn lanĉitajn ĉi-okaze
- Alvokas diskonigi kaj utiligi la elektronikajn rimedojn por distanca lern-apogo
- Esprimas sian ĝojon pro la regula aperado de la Esperanta versio de la UNESKO-Kuriero dankante la sindediĉan iniciatinton HUANG Yinbao « Trezoro » kaj la redakcian kaj tradukan skipon de la Kuriero
- Rekomendas al siaj sekcioj kaj kursgvidantoj uzi tiun tekstmaterialon kadre de sia instruado kaj tiel disvastigi la ideojn kaj agadojn de UNESKO, varbi grupajn kaj individuajn abonojn por ĝi
- Alvokas la samajn helpi revivigi malpli aktivajn sekciojn, kontaktante la estraran kunordiganton Stefan MacGill

Gravas

- Partopreni kaj partoprenigi en la nuna 70-jara ILEI-jubileo kaj memorjaro pri Hector Hodler en 2020
- Apogi utilajn iniciatojn, i.a. ebligi al junaj aktivuloj partopreni instruan kapabligon kaj diplomiĝon pri Esperanto
- Partoprenigi ilin en la 53-a ILEI-Kongreso en Kebekurbo, Kanado
- Varbi legantojn por *Internacia Pedagogia Revuo* kaj por *Juna Amiko,* kaj utiligi, komenti, pliriĉigi la du revuojn per artikoloj
- Allogi novajn membrojn por la Ligo
- Helpi al diversaj komisionoj, kiel tiuj pri lernolibroj kaj legaĵoj, kunlabore kun www.edukado.net
- En amuze kleriga maniero sciigi nemovadanojn pri la elektronikaj rimedoj ekkoni Esperanton kiel ponton al « fremdaj » kulturoj, inkl. la Esperantan.